

## SKIZE PRI FERNANDO DE DIEGO

Fernando DE DIEGO (1919-2005) lernis Esperanton en 1933 dum longa poliomjelito-konvalesko kaj tuj aliĝis al Kultura Klubo, la anarkiisma E-grupo de Zaragozo. En la E-klubo li povis legi ĉiujn numerojn de *Literatura Mondo* eldonitajn en 1935 kaj en la unuaj monatoj de 1936, kio signis lian definitivan enamiĝon al nia lingvo. La hispana milito (1936-39) plene trafis lin, kiu devis fakte soldati de 1938. Tri jarojn poste lin trafis epidemia tuberkulozo, sed li sukcesis resaniĝi en montara vilaĝo, kie loĝis unu el liaj onkloj.

Li edziĝis en 1946 kaj laboris kiel tradukisto el la angla kaj la franca por hispanaj eldonejoj. Tri jarojn poste li kaj la edzino transloĝiĝis al Karakaso, kie du el liaj kvin fratoj jam instaligis. Komence li oficis kiel tradukisto kaj redaktoro de ĵurnal-oficejoj, sed en 1952 dungis lin la petrol-kompanio Shell, por kiu li laboris dek jarojn kiel ĉefredaktoro de la monata revuo *Tópicos Shell*.

En 1962 li ekziĝis sukcesinte atingi ekonomian sendependon kaj ekloĝis en Kanarioj kun la edzino kaj la filo. Tie Juan RÉGULO eldonis lian unuan tradukon, *La arbo de la sciado*, de Pio BAROJA.

En 1964 li reiris al Zaragozo por prizorgi la maljunajn gepatrojn. En 1968 li partoprenis sian unuan kaj lastan UEA-kongreson, en Madrido. De 1970 ĝis 1986 li dediĉis sian tempon kaj energion al Esperanto: tradukis el la hispana, angla, franca, galega; kunlaboris per artikoloj, beletraĵoj kaj recenzoj en *Monda Kulturo*, *Horizonto*, *Esperanto*, *Fonto*, *Dialogo*, *La Gazeto*, *Venezuela Stelo*...; prelegis en pluraj urboj hispanaj, en Venezuelo, Hungario kaj Pollando.

Ĝuste en Pollando li konatiĝis kun Czesá, sia dua edzino. Denove cirkonstancoj postulis transloĝigon en 1986, ree al Karakaso.

En 1990 li decidis kompili vastan vortaron hispanan-Esperantan: dum pli ol kvar jaroj li senhalte laboradis tagon post tago. la vortarego iĝis lia vivo-verko: 1300 grandformataj paĝoj, 50750 kapvortoj, dekmiloj da parolturnoj kaj proverboj, centmiloj da ekzemplofrazoj... Nur en 2003 ĝi vidis la lumon post zorga reviziado.

En 1996 la paro transloĝiĝis al Pollando kaj, tute neatendite, Czesá forpasis en 2004. Fernando denove iris al Hispanio kaj nur unu jaron postvivis la edzinon: la 1-an de julio 2005 li forpasis 85-jara en Zaragozo.

Fernando de Diego verkis originale unu lernolibron por hispanlingvanoj kaj du interesegajn eseojn: *Pri esperanta traduk-arto* kaj *Pri literatura kritiko*. En la unua li analizas la uzadon de neologismoj kaj arkaismoj, kritikis la ĝis-tiamajn E-tradukojn kaj finas per kelkaj trafaj konsiloj. La duan konsistigas kvin eseoj pri beletro, lingvo kaj ideologio de Esperanto verkitaj same elegante kiel polemike.

Sian lokon en la Esperanta Parnaso li elfaris tamen per siaj multaj tradukoj, kiuj kunaj formus volumegon de 3700 paĝoj. De Diego ĉiam zorge elektis kaj skrupule tradukis el unuarangaj aŭtoroj: li donacis al ni verkojn en Esperanta vesto de i.a. BAROJA, BÉCQUER, CELA, CERVANTES, GARCÍA LORCA, GARCÍA MÁRQUEZ, MACHADO, NERUDA, VALLE-INCLÁN... Ankaŭ el aliaj beletoj li plukis: jen CASTELAO el la galega; jen BALZAC kaj MAUPASSANT el la franca; jen HEMINGWAY, LONDON kaj STEVENSON el la angla.

Ĉiuj tradukoj de Fernando de Diego prezentas modelon de lerto, elasto kaj pacienco. Demandite pri sia neologismemo, li diris en 1994:

“La plej granda parto de miaj neologismoj kuŝas sur la paĝoj de PIV jam de multaj jaroj. La neologismoj multiĝis kun la kresko kaj maturiĝo de Esperanto, kaj se ili ĉesus aperi, la lingvo mortus senrimede de anemio kaj ankilozo. Mia utiligo de neologismoj povas ŝajni troa al samideanoj kun nesolida lingvo-scio, tamen mi ne verkas por ili, sed por esperantistoj, kiuj profunde posedas Esperanton kaj amas nian beletron.”

Fernando de Diego rangas nun en nia Elizeo apud aliaj granduloj, apud KALOCSAY, apud WARINGHIEN, apud ZAMENHOF. Nia plej bona omaĝo estu atenta legado de liaj verkoj.

el mia artikolo en *Esperanto* de oktobro 2005

*Antonio Valén*